## *Sudokuo*

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 5 | 4 | 2 | | 6 | 8 | 1 | |
| 1 | | | | 5 | | | | 3 |
| 7 | | | | 8 | | | | 2 |
| 2 | | | | | | | | 4 |
| | 9 | 7 | | | | 6 | 5 | |
| 6 | | | | | | | | 7 |
| 9 | | | | 4 | | | | 6 |
| 5 | | | | 2 | | | | 8 |
| | 4 | 2 | 7 | | 1 | 9 | 3 | |

Enskribu en la liberajn kestojn la ciferojn 1 – 9! En ĉiu horizontala kaj vertikala linioj kiel en la malgrandaj kvadratoj devas aperi ĉiuj naŭ nombroj. Ĉio estas per logikaj paŝoj solvebla.

⌘

***Solvo el la marta numero:***

*horizontale*
1. kor' 3. agl' 6. arbo 7. mi 8. mod' 10. ili 12. rib' 14. odo 17. kol' 19. ilo 21. li 22. timo 23. not' 24. tie

vertkale
1. kom' 2. radik' 3. abi' 4. golo 5. lig' 9. or' 11. idiot' 13. boto 15. ol 16. alo 18. lit' 20. ole'

⌘

Kontaktu nin! Gun.Eb@t-online.de +49 3831 490003

# Stralsundaj frekvencoj

Per Esperanto por popolkompreniĝo

jaro 2008 — 39 — majo

## Kronpretendantoj

Mi estas grafo Réaumur,
malamas vin en tuto !
Vi ŝatas Celson laŭ dezir',
vi apostato-bruto!
La reĝo Fahrenheit, jen li
rimarkas la plezuron:
"Pli belis temp'; jam uzis vi
laŭ mi eĉ la mezuron!"

laŭ Christian Morgenstern

⌘

## Estas la turdo

Estas la turdo, tirilant',
printempo, kortuŝita kant';
mi sentas, kiel el la grundo
spiritoj kreskas de l' profundo.
La vivo fluas sonĝe for –
mi kredas esti arb' kaj flor'.

laŭ Theodor Storm

***Ĉŭ vi jam sciis,***

*ke bovinoj kontribuas ion al la ozontruo?*

Ne nur aŭtomobiloj damaĝas la medion. Ankaŭ la naturo mem kontribuas al la plia tralasivo de la ozontavolo. Bovinoj produktas dum maĉado de herbo metangason kaj tio estas 14-oble pli agresiva ol la karbodioksido de niaj aŭtoj. Po jaro unu ruktanta bovo evoluas same multaj damaĝaj substancoj kiel 75-ĈP-aŭtomobilo, kiu veturas 10000km.

*ke KD-oj ne eterne funkcias ?*

Kiu kredas, ke sia muzikkolekto estus storita por ĉiam sur KD, povus travivi iam malagrablan surprizon. Materialesploristoj koncesias al la ŝatataj diskoj nur maksimuman vivodaŭron de dudek jaroj. Kaŭzoj por rapida kadukiĝo estas polvo, grataĵoj, fingro-premaĵoj, varmeco kaj rekta sunlumo. Por esti certe, rekomendas ekspertoj fari kopion post kvin jaroj aŭ stori sur firma disko.

*ke viraj cerboj pli rapide maljuniĝas ?*

Mense aktiva ĝis la alta aĝo ! Kiu ne revas pri tio? La ŝancoj ne estas malbonaj, kondiĉe oni vivas sane, trejnas siajn grizajn ĉelojn kaj - oni estas virino! Ĉar, se viroj maljuniĝas, ili anatome perdas trioble da cerboamaso kiel virinoj. Enketoj pruvis, ke ĉe viroj jam inter la 18-a kaj 45-a vivaĝo reduktiĝas la koncentrad-povo. Virinoj el tiu ĉi aĝogrupo evidente pli sukcesis dum la testoj.

eltrovita el la revuo "TV klar"

## *Kio, kiam, kie?*

Post la sukcesa landa kunveno en Rostock nun jam „vokas" novaj aranĝoj la esperantistojn ankaŭ de nia regiono. Jen nur kelkaj datoj al pluaj renkontiĝoj, kiuj povus esti interesaj por niaj samideanoj:

17. – 24.5. IFEF-kongreso en Poznan
informoj: +48 601 703231

4. 6. E-kunveno en Prenzlau
informoj: Edeltraut Henning

10. – 18.6. ĈEP en Mielno
informoj: +48 503 417825 (Cz. Baranowski)

2. 7. LAMA-Ausflug zum Landtag nach Schwerin
informoj: Brunhilde Pfennig

19. – 26.7 93-a UK en Rotterdam
www.uea.org

26.7 –3.8. SEFT-tendaro en Thomsdorf
informoj : Werner Pfennig

18. 9. Kunveno de la E-grupo Antaŭpomerio en Stalsund kafejo Strahl informoj: Vidu lasta paĝo!

24. –26.10. Semajnfina seminario en Neubrandenburg
informoj: Werner Pfennig

13. 11. Kunveno de la E-grupo Antaŭpomerio en Prenzlau
informoj: Vidu lasta paĝo!